

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922

Jaro XIX

Marĉo, 1938

N-ro 6

B. Mazurski

RECENZON! — NE APLAUDON!

Estis tempo, antaŭ longaj jaroj, kiam la Esperanto-literaturo staris ankoraŭ en la komenco kaj estis tre malriĉa. Tio estis en la periodo de la necerteco, kiam multaj ankoraŭ dubis ĉu la novenaskita lingvo povos vivi kaj ĉu povos ekzisti literaturo en ĝi. Tiam ĉiu nova Esperanta libro estis unuanime kaj forte aplaudata de la esperantistoj, ĉar, en tiu tempo, eĉ modesta libreto estis valora paŝo al la firmigo de la lingvo. La cirkonstancoj por laborado en tiu ĉi kampo estis eksterme malfacilaj, sed ni konstatas, ke, feliĉe, inter la verkoj de la plej frua periodo de nia lingvo, troviĝas tre malmultaj fuŝaĵoj. Unu el la kaŭzoj de tiu ĉi manko de fuŝverkoj estis kredeble la fakto, ke la modesta literatura trezoro permesadis facilan trastudon kaj orientiĝon pri tio, kio estis farita kaj kio restis por fari.

Tiu ĉi periodo, pri kiu ni kun admiro rememoras, pasis jam delonge. De tiam multaj aferoj ŝanĝiĝis. Multaj verkoj aperis, aperas ankoraŭ nun. Ni havas jam la librojn, kiujn ni bezonas, ni havas eĉ librojn, kiujn ni ne bezonas. Kaj la esperantista publiko komencis havi guston: ĝi ne plu kontentiĝas per ia verketo kun hezitanta lingvo kaj kun senzorga eksteraĵo. La literatura kampo estas jam malfacile trairebla; por studi la literaturon, la lingvon, la movadon oni bezonas nun ne tagojn kaj ankaŭ ne monatojn, sed jarojn — jarojn da serioza studado. La taskoj de literaturisto kaj verkisto fariĝis tre malfacilaj. Se oni volas esti konscia aŭtoro aŭ tragukanto, oni devas dediĉi sian tutan tempon, aŭ preskaŭ la tutan, nur al tiu ĉi celo.

Unu afero, tamen, restis senŝanĝa en Esperantujo: *La maniero de recenzado pe noveaperantaj verkoj*. Nun ankoraŭ,

kiel antaŭ pli ol tridek jaroj, anstataŭ kritika esplorado de ĉiu verko, ni notas ĝian aperon kun la sama ripetata, kvazaŭnecesa aplaudado. De tiaspeca recenzo ni lernas, ke — ĉiam, kvazaŭ devige — la verko estas bona, la aŭtoro — admirinda, la tradukisto — lerta kaj sperta, la eldonisto — kuraĝa, la lingvo — preskaŭ perfekta, da preseraroj estas malmulte, kaj nia literaturo riĉiĝis per valora verko.

Tamen, la efektiveco montras al ni, ke en nia literaturo, — paralele kun sendube valoraj verkoj — ekzistas ankaŭ amaso da fuŝaĵoj. Tiu ĉi amaso ne estas tom sensignifa, kiom oni estas preta ĝin pensi, kaj ĝi havas la tendencon kreski pli kaj pli. La kaŭzo de tiu ĉi kreskado de la fuŝverkoj kuŝas en tio, ke la mondo ne estas tro akurata rilate al siaj devoj; anstataŭ iri la malfacilan kaj krutan vojon de serioza kaj funda studado de ĉio aperinta ĝis nun, verkistoj kaj tradukistoj de malalta valoro preferas la glatan kaj facilan vojon de feliĉa nesciado kaj ignorado de ĉio farita antaŭ ili. Kaj, ĉar la kampo de la internacia lingvo plivastiĝas konstante, ni havas plenan rajton timi, ke la fuŝproduktado trovos favorajn cirkonstancojn por plua ekzistado kaj disvolviĝado.

La sola rimedo, kiu povas ŝirmi nin kontraŭ la danĝero, minacanta lingvon kaj movadon, estas la *konscia recenzado*. Nia recenzo, kie multaj jam prave avertis, ne estas tia, kia ĝi devus estis. La kaŭzoj de tio estas du:

1. Recenzas elementoj naivaj,
 2. Recenzas elementoj sen moralo.
- Naivaj estas tiuj, kiuj ne konas funde la aferon de la lingvo internacia kaj naive kredas, ke ju pli da libroj, des pli (daŭrigo sur paĝo 7.)

Jana funebras nau fratojn

(Bulgara popola kanto)

*Jano, junolino! Jen sonadas kornoj,
du kornoj inkrustaj kaj du seninkrustaj.
Tamen ĝi ne estas du kornoj inkrustaj,
sed du junulinoj, du zagoraninoj;
de Zagore*) venas, pri Zagore ploras:*

*— Zagore, Zagore, amata vilaĝo,
bela kaj aminda, forte fruktodona,
ni dufoje jare rikoltas kaj draŝas,
rikoltas kaj draŝas, falĉas kaj kolektas,
trifoje dum jaro blankaj rozoj floras,
trifoje dum jaro abeloj ariĝas.*

*Kaj vi, fremda lando, malbenita estu,
malbenita estu, tute dezertiĝu!*

Mi naŭ fratojn havis, kun ili ekiris;

kun naŭ mi ekiris, sole unu restis,

kaj li nun malsana, supre en montaro,

sub malvarma ombro, en arbaro verda

kuŝas apud fonto, kun akvo malvarma.

Kiel hejmen iri kaj al panjo diri!

*Kiel ŝi demandos: „Jano, filin' kara,
kie la naŭ fratoj?“ Kaj mi al ŝi diros:*

„Panjo, kara panjo, ĉiuj ja edziĝis“.

*Kaj ŝi min demandos: „Jano, filin' kara,
kie naŭ donacoj de naŭ bofilinoj?“*

Mi al ŝi respondos: „Panjo, kara panjo,

ili donis, panjo, jen — naŭ kufojn nigrajn,

ili donis, panjo, jen — naŭ nigrajn plumojn“.

Trad. Simeon Hesapčiev

*) regiono en Bulgarujo.

Tiu ĉi kanto troviĝas en la antologio de Iv. Bogoev. „Bulgaraj popolaj kantoj kaj proverboj“, eldonita en Budapeŝto en 1842.

Eksterordinaran forton de la imago kaj de la iluzio ni konstatas en la komenco de la kanto, kiu estas nea komparo — specifa por la bulgara popola kanto. La iluzio de a popola aŭtoro (ni imagas, ke li aŭskultas la voĉojn) estas perfekta; li diras, ke li aŭdas sonon de kornoj — du inkrustitaj per metalo kaj du ne. Kaj poste, kiam li vidas la du junolinojn, la aŭtoro komprenas, ke tio estas iliaj voĉoj.

Fortan emociecon kaj intimecon de la tono donas ankaŭ la alparolo (al Jano) en la komenco. La vokativaj formoj poste kelk-

foje ripetiĝas kaj sentigas al ni la atmosferon de amo kaj intimeco inter patrino kaj filino. La amo al naskiĝloko kaj al patrujo estas trafe esprimita por la ripetado de la alvoko (Zagore, Zagore...) kaj per serio de hiperboloj. La rimo en la bulgaraj popolaj kantoj estas tre malofta.

La temo de la kanto estas prenita el la vivo: multaj el la geloĝantoj de la malriĉaj montaraj regionoj en Bulgarujo iras somere al la ebenaĵoj por labori dum la rikoltado. Ordinare unu viro, malpli juna kaj pli sperta, kolektas la rikoltistojn kaj gvidas ilin dum la vojaĝo kaj dum la laboro. Post la fino de la rikoltado la grupo revenas hejmen.

La tradukinto

POR PURA LINGVA EVOLUO II

Esperanto egala al naciaj lingvoj?

Ekzistas esperantistoj, kiuj — kompreneble bonintence — ne ĉesas ripeti, ke Esperanto estas ĉiurilate egala al la naciaj lingvoj. Dirante tion, ili kredas servi al la propagando de la lingvo, sed, efektive, iliaj vortoj malbone efikas internen, t. e. sur la kvalito de la lingvo mem.

Sendube, Esperanto estas almenaŭ egalvalora al — eble eĉ pli valora ol — la lingvoj naciaj; sed per neniam argumentoj oni kapablas forrezoni la fakton, ke ĝi estas lingvo artefarita kaj ne senbride kaj ĥaose kreskinta.

La artefariteco de Esperanto elmontriĝas diversrilate. En la kadro de tiu ĉi artikolo ni priparolu nur unu tian fakton, kiu konstante influas malbone nian literaturan lingvon:

Ni scias, ke pere de Esperanto multaj homoj sukcesas riĉigi la propran menson, akirante en spirita regiono kapablojn, kiujn ili sen Esperanto eble neniam akirus. Ni scias ekzemple, ke ekzistas personoj, kiuj kapablas fari longajn paroladojn en Esperanto, sed ne en sia lingvo nacia. Aliaj verkas aŭ tradukas artikolojn, eĉ librojn en Esperanto, sed antaŭ sia esperantistiĝo neniam pensis pri tia agado en sia propra lingvo. Ankoraŭ, aliaj verkas poemojn en Esperanto, argumentante, ke Esperanto estas lingvo speciale favora al versfarado, sed en la propra lingvo ili ne sukcesas kuneglu poemeton.

Ĉu efektive la sciado de Esperanto dotis tiujn homojn per tiaj talentoj? Ne, nepre ne! Esperanto povas riĉigi la menson, akriĝi la spiriton, plibonigi kapablojn, sed ĝi ne donacas kvalitojn, tiom malpli talentojn. La kaŭzo de tio, kion oni preskaŭ ĉiutage povas konstati ĉe tiom multaj esperantistoj, ne estas talentoj, sed — bedaŭrinda kaj maldolĉa vero! — multrilata fuŝado de la lingvo.

Imagu, ke la rapidlingva parolanto faras sian paroladon, anstataŭ en Esperanto, en sia propra lingvo, sed kun precize la samaj kvalitoj, bonaj kaj malbonaj! Imagu, ke la lerta tradukemulo donacas al ni libron tradukitan en nia propra lingvo, sed kun precize la samaj stilaj kaj

gramatikaj eraroj! Fine imagu, ke la rapidpluma poeto regalas nin per poemoj nacilingvaj anstataŭ Esperantaj, sed kun precize la samaj strange disĵetitaj vortoj, kvazaŭrimoj, akcentmodifoj k. s. Ĉu tiaokaze la parolanto, la tradukinto kaj la poeto ne farus sin publike ridindaj?

„Sen ia dubo!“ oni respondas al ni, „sed ĝuste en Esperanto tiuj homoj lertigis sin, kaj ĝuste Esperanto estas lingvo speciale taŭga por tia sinlertigado“.

Tamen ne; en kaj per Esperanto oni povas disvolvi siajn kapablojn kaj talentojn, sed, ne posedante ian talenton, oni ne sukcesas krei ĝin nur per Esperanto, eĉ ne, sciante la lingvon dum tuta vivo. Kiu ne kapablas oratori, verki, traduki aŭ fari poemojn en sia propra lingvo, neniam sukcesos fari ion tian en Esperanto, ĉar neniu povas fariĝi lerta esperantisto, tute ignorante la gepatran lingvon, kiun oni ĉiutage uzas. Neniu povas evolui en Esperanto, ne iagrade evoluante ankaŭ en sia nacia lingvo. Kaj se efektive oni prezentas al ni verkojn originalajn aŭ tradukitajn kaj poemojn kreitajn de tiaj homoj nespertaj en la gepatraj lingvoj ni estu certaj, ke en iliaj plumproduktoj svarmas eraroj.

Jen la danĝera diferenco inter Esperanto kaj la lingvoj naciaj: en ĉiu nacia lingvo, ĉiu iom instruita homo tuj rimarkas la erarojn, ĉar la fiksitaj lingvaj reguloj malpermesas, ke oni peku kontraŭ ili. Kaj se iaokaze ne ordonas regulo, ekzistas ankaŭ kutimoj, postulantaj obeadon. Kontraŭe, en Esperanto la eraroj ne tiom facile rimarkiĝas, unue pro tio, ke la granda amaso da esperantistoj konsistas ankoraŭ el studentoj ne kapablaj juĝi pri korekteco aŭ erareco; due, ĉar, malgraŭ sia logikeco, la Esperantaj lingvaj reguloj estas tiom elastaj kaj lasas tiom da libereco, ke oni povas diversmaniere klarigi al si iajn gramatikaĵojn, pro kio kreskis pri iaj aferoj pli malpli diferencaj personaj opinioj; kaj trie, multaj esperantistoj, precipe en la lastaj jaroj, pli malpli ignoras la logikon, enkondukante en la lingvon tiujn ecojn
(daŭrigo sur paĝo 7.)

NE FUSU LA LINGVON!

Напоследък, въ много есперантски издания, та дори и въ самият органъ на Българския Есперантски Съюзъ, се срещатъ често едни своеобразно окарикатурвания на хубавия международенъ езикъ. Тия окарикатурвания се състоятъ въ *писането на есперантски думи и изречения съ български букви*. Макаръ и да изглежда на пръвъ погледъ твърде удобна и практична, въ известни случаи, тази система на писане крие въ себе си недостатъци, нѣкои отъ които сж отъ сжщественно значение за нашата пропаганда и за нашиятъ успѣхъ. Тази система се практикува обикновено отъ хора, които или не знаятъ още добре езика, или, макаръ и да претендиратъ да го знаятъ, не сж се проникнали отъ неговиятъ духъ и нѣматъ нужното езиково чувство.

Не трѣбва да се забравя, че всѣкой езикъ си има своя фонетика, която се различава отъ тази на другитѣ езици. Съ знацитѣ, които единъ езикъ употребява за своята фонетика, не винаги могатъ да се изразятъ точно звуковетѣ, които другъ такъвъ употребява. Международниятъ езикъ си има своя характерна и отличителна фонетика, която е различна отъ тази на националнитѣ езици, следователно е различна и отъ тази на българскиятъ езикъ.

Написани съ писменнитѣ знаци на другъ езикъ, думитѣ губятъ своитѣ специфични особености, осакатяватъ се и ставатъ, въ нѣкои случаи, наразбираеми, та дори и смѣшни. Какъ напимѣрь, ще ви се стори френското изречение *Je vous aime*, написано съ български букви „же ву земъ“ както го пишатъ хумористичнитѣ списания и вестници, когато искатъ да подиграятъ нѣкого, че не знае добре чуждия езикъ! И какъ ви се струва английското изречение „*Look at the muddy road*“, което единъ нашенецъ преди нѣколко години, безъ ни най-малко да се посвени, бѣше предалъ съ „лукъ атъ ди мѣдди родъ!“

Международниятъ езикъ есперанто, който има още да се бори за разпрѣсване на предразсѣдцитѣ, които сжществуватъ около него губи твърде много отъ това своеобразно предаване на есперантскитѣ думи и изречения съ български букви. Въ мнозина отъ нашитѣ българи е дълбоко залегнало удеждението, че всичко въ есперанто е хубаво, съ изключение на самиятъ

езикъ, който билъ ужъ страшно неблагозвученъ и приличалъ на цигански. Въ сжщностъ, есперанто е единъ отъ най-звучнитѣ езици на свѣта, но за да се убеди човѣкъ трѣбва да слуша когато го говори човѣкъ, които го знае както трѣбва, и да си запушва ушитѣ, които разни знайни и незнайни самидеановци кепазятъ езика, както го говорятъ публично безъ да го знаятъ добре. Писането на есперантски думи съ български букви прави мечешка услуга на есперантската пропаганда у насъ, защото закрепва у несведующитѣ ора убеждението, че есперанто по звука си е „цигански“. Защото, наистина „*Булгара есперантисто*“ е само една жалка пародия отъ „*Bulgara esperantisto*“. А предаването на цѣли изречения съ български букви като напр. „чу ви воласъ лерни есперантонъ“ вмѣсто „*ĉu vi volas lerni esperanton*“, компрометира както езика, така тжщо и този, който си служи съ такива формули. (За какво му сж пѣкъ тия „Ъ“ на края на думитѣ?!)

Българскитѣ есперантисти — поне ония отъ тѣхъ, които искатъ съзнателно да работятъ за въ полза на есперанто — трѣбва да разбератъ веднажъ за винаги, че писането на еспер. думи съ бѣлг. букви излага твърде много и езика, и самитѣ тѣхъ.

Какъ обаче, трѣбва да се постѣпва, когато ни се налага да употребиме нѣкой есперантски изразъ или дума? — *Най-добриятъ начинъ е да се пише съ есперантски букви*. Това правило трѣбва да се спазва безусловно. Ако пѣкъ нѣмаме на разположение латински букви, то тогава трѣбва да се лишимъ отъ удоволствието да осакатяваме езика и трѣбва да *употребимъ съответния преводъ на думата или изречението*. Напимѣрь, ако нѣмаме латински букви за да напишемъ името на органа на Б. Е. Съюзъ, то безъ колебание трѣбва да напишемъ „*Български есперантистъ*“ и всѣкой човѣкъ ще ни разбере какво казваме. Но, понеже всички печатници въ България иматъ поне единъ елементаренъ запасъ отъ латински букви, трѣбва да избѣгваме и системата на превеждането, както винаги се стараемъ, щото *есперантскитѣ думи да бждатъ написани съ съответнитѣ букви*.

B. Mazurski

25-ия ЮБИЛЕЕНЪ КОНГРЕСЪ

на Бълг. есперантски съюзъ ще станене
въ Севлиево на 16 — 18 юли, т. г.

Севлиевското гражданство съ живъ интересъ следи подготовката на конгреса, като помни добре уредениятъ миналогоди-



Tusista domo „Rosica“ en la montaro
apud Sevlievo.

шенъ конгресъ на Б.Т.С., посетителитъ на който останаха много доволни отъ госто-приемството на севлиевци. Въ дневния редъ на конгреса се опредѣлятъ, между друго, частни заседания на есперантисти, учители, туристи, въздържатели и т. н. Скоро ще се издаде илюстриранъ пжтеводенъ листъ за Севлиево съ текстъ на Есперанто, който ще се праща бесплатно при поискване. Издадени сж за конгреса пощенски картички съ изгледи и текстъ, а сжщо така и марки за пропаганда. Последнитъ се пращатъ бесплатно. Презъ време на конгреса ще се уреди голъма есперантска изложба, въ която ще се изложатъ: есперантски книги, снимки, есперантска кореспонденция отъ цѣлъ свѣтъ (илюстрирани пощенски картички) есперантски списания и др. Въ изложбата ще се уреди отдѣлъ „Есперанто и туризъмъ“ — Умоляватъ се съидейниците, които могатъ, да пратятъ материали за изложбата, или лично да донесатъ такива. Въ втория случай да ни предизвестятъ.

Между Севлиево и съседнитъ градове има постоянни автомобилни съобщения нѣколко пжти на день. Автомобилнитъ агенции правятъ специалио намаление на конгресиститъ.

Следъ конгреса ще се уредятъ излети въ Срѣдния Балканъ до Юмрукчалъ, Мара

Гидикъ, Амбарица, Джендема, Мазалатъ, Кадемлия и др. Излетниците ще посетятъ хижитъ Росица, Мазалатъ, Мара Гидикъ и др.

Конгресната карта е 10 лв. до 12 юли, а следъ тази дата 15 лв.

Всичко за конгреса да се отправя до председателя на еспер. д-во „Fratiga stelo“ — Симеонъ Ст. Хесапчиевъ, у-лъ по литература въ гимназията, Севлиево.

Конгресенъ комитетъ:

Сим. Ст. Хесапчиевъ, гимн. у-лъ, Ботю Минковъ, адвокатъ, Дочо Т. Станевъ, абаджия, Дим. Р. Карагъзовъ, т. п. чиновникъ, д-ръ П. Пѣевъ, зжболѣкаръ, А. Бъчваровъ, банковъ чиновникъ, Ст. Ангеловъ, печатаръ, Ат. Николовъ, г-ца К. Бучакчиева, Цв. Мандевъ, фотографъ, Христо Ганчевъ.



Pejzaĝo en la monto „Balkano“
proksime al Sevlievo.

XXV-a bulgara esperanto-kongreso okazos en Sevlievo dum 16 — 18 de julio 1938.

La samideanoj el Sevlievo prenis la honoran taskon [aranĝi nian kongreson kaj gastigi la bulgarajn kaj eksterlandajn geesperantistojn.

La samideanoj, kiuj venos al Sevlievo, havos grandan plezuron pasigi kelkajn tagojn inter gefratoj, viziti la vidindaĵon de la urbo kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.

Aliĝi tuj!

Lokoko — adreso:

Sim. Hesarĉiev — Sevlievo

— La Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T. A. G. E.) starigis Internacian Korespondadoficejon por Geinstruistoj kaj Gelernantoj. — Ĉiuj, kiuj deziras interkorespondadi kun ali-landaj gekolegoj aŭ gelernantoj, sendu siajn adresojn al la sekretario de T.A.G.E. — Oni senpage presigos la adresojn en I.P.R. kun la ordinaraĵ mallongigoj. Se oni derizos tujan respondon aŭ specimenan ekzempleron de I.P.R., tiam sendu unu respondkuponon. La adresoj estos almenaŭ presigita ses foje jare. Petu pluajn informojn de la sekretario

K. H. Sportel

Nieuw — Scheemda (Gr.)
Nederlando.

Есперантска литература. Голѣмъ изборъ.

Есперантски значки — отъ 18-25 лв.
Каталогъ **безплатно.**

Поржчки при „СПИКТУРН“ международенъ институтъ, 50. ул. Алабинъ — София.

Radio-Sciigo. La Bulgaraj Radio- Stacioj Sofio (ondolongo 325 m.) Stara-Zagora (ondolongo 214 m.) kaj LZA (ondolongo 20 m.), dissendas ĉiu monate la 15-an, 21, 30, (MET) Esperanto paroladojn. Ĉiuj samideanoj aŭskultu ilin kaj gratulu la stacion.

Излѣзе отъ печатъ:

ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАРСКИ речникъ
152 стр. Цена 15 лева. Суми се превеждатъ по пощенска чекова смѣтка 3810 и чрезъ пощенски и гербови марки. Поржчки при Димитъръ Ивановъ, 80, ул. Н. Рилски -- Русе.

„Bulgara Esperantisto“ — organo de la Bulgara Esperantista Asocio.

Adreso: strato Alabin № 50. Sofio.
Bulgarujo. Poŝtĉekkonto: 133

Jarabono: Enlande — 20 bul. levoj, Eksterlande — 2 sv. fr., 4 respondkuponoj en egalvaloro, **Anoncoj:** 1 kv. cm. — 1 levon.

— Ni montru nian **solidarecon!** Dum multaj jaroj aperadis en la ĉeĥoslovaka ĵurnalo „Narodni Politika“ Esperanto-angulo, lerte prizorgita de Julie Šipichova en Prago. Pasintan jaron ĉi tiu konata propagandistino festis sian 250-an publikigon. Nun venis nova direkto kaj — la esperanto-angulo malaperis.

Bulgaraj esperantistoj, helpu al niaj ĉeĥoslovakaj samideanoj reakiri la perditan terenon! Sendu deziresprimojn al la redakcio de „Narodni Politika“,

Vacslavske Namesti, Prago. — Ĉ.S.R.

Filatelistoj! Sendu per rekomengita letero kelkajn Aero Pm. de via lando. Mi tuj sendos egalvaloron de Belgaj P.M. Respondo garantiita. S^o M. de Ruydt, Rue Van Schoonbeke, 148, Anvers, Belgujo.

— **Nova granda sukceso de Esperanto en Bulgarujo.**

La ĉiutaga bulgara gazeto „NOVA KAMBANA“ publikigas unu fojon en la semajno — merkrede, specialan esperanto-paĝon. La paĝo enhavas bulgarlingvajn artikolojn pri la lingvo internacia, pri la en- kaj eksterlanda vivo de la esperantistoj ktp. La entrepreno estas privata kaj ne dependas de la BEAsocio, sed ĝi estas granda venko por ni. La esperantistoj ĉiulandaj estas petataj sendi kuraĝigajn leterojn kaj materialon al: Redakcio „NOVA KAMBANA“, Esperanto-paĝo, bulvarado „Makedonia“ № 5, Sofio, Bulgarujo.

Ĝustigo. RECENZO.

En la lasta numero de nia organo „BULGARA ESPERANTISTO“ ne estas donita la titolo de la verko, prirecenzita en la rubriko RECENZO. Tiu ĉi verko estas la laste aperinta en Bulgarujo lernolibro, titolita:

Асенъ Григоровъ
ЕСПЕРАНТО

Учебникъ читанка за начинающи.
София. 1937 година.

Esperante: „Asen Grigorov, ESPERANTO lerno- kaj legolibro por komencantoj, Sofio, 1937“.